# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1983

N° 86 - 87


# AŬTUNA FEDERACIA LABORKUNSIDO EN SETO

Ceestis 9 el la 15 federaciaj estraranoj kaj komitatanoj.

La ĉefa pridiskutita temo de la matena parto estis "Sudfrancia Stelo" kaj jen la decidoj:

- Roberto Frus restas direktoro de S.F.S. kaj,i.a.,esperas sukcesi ricevi de la poŝtaj instancoj,favorajn sendkondiĉojn ...
- La tekstojn por S.F.S. oni sendu al R. Frus kiu,kun la helpo de la nimaj grupanoj,ilin pretigos.
- R. Frus sendos S.F.S. akurate je la fino de ĉiu trimestro. La presotaj tekstoj devos lin atingi unu monaton antaŭe.
- La abonkosto por 1984 estas 15,00F. Sendi la monon kun adreslisto al S-ino Négron,federacia kasistino. Si sendos kopion de la adreslisto al R. Frus.
- Frédéric Maurin rezignas sian proponon de interna cirkulero por uzo de la federaciaj estraro kaj komitato. La propono ricevis tri aprobojn,tri malaprobojn kaj ok sindetenojn.

Antaŭ la fino de la kuranta jaro,F. Maurin forlasos nian regionon. Car li estas rifuzanto je soldatservo,laŭ speciala statuto,la pariza sidejo de U.F.E. dezirus lin ricevi. Decido de la ministerio estas ankoraŭ ne alprenita. Dum lia foresto de la federacio, F. Maurin tamen restos komitatano kaj,krom sia propra voĉo, Jean Henin estas elektita duma federacia prezidanto.

J. Hénin raportis pri la lasta komitatkunveno de U.F.E.,kies membro li estas: 1)Klopodoj por ke F. Maurin deĵoru ĉe la sidejo de U.F.E. dum sia deviga civilservo. 2) Aranĝo de "festivalo". 3) Turneo de "la krizalido". 4) Kampanjo "Sel'in",prestiĝa broŝuro. 5) Kandidatiĝo de U.F.E. por organizi la Universalan Kongreson en 1989.

Post la komuna tagmanĝo ni rekunsidis kaj ĉefe diskutis pri disdivido de la taskoj sine de la federacia komitato:

- Ni findecidis pri kio ĉi-supre indikita koncerne S.F.S.,
- Rilatoj kun U.F.E.: F. Maurin kaj J. Hénin.
- Akcepto de eksterlandanoj: Y. Vierne.
- Financoj: S-ino Négron.
- Administrado: J. Amouroux.
- Organizo de kongresoj kaj komitatkunvenoj: la grupoj gastigantaj
- Lingvostaĝoj en Valras: S-ino Authier kiu rilatos kun la provenca federacio koncerne la staĝojn,kiujn ĝi intencas aranĝi. Si pretas aranĝi lingvostaĝon en Valras,principe de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1984.

- Rebatservo: J. Hênin kaj J. Amouroux.
- Rilatoj kun la gazetaro pri federaciskalaj informoj:Sro Borque.

Rilatoj kun oficialuloj: S-ro Llech-Walter,ne ĉeestanta, proponata.

Raporteton pri sia fakagado,ĉiu respondeculo regule sendu al la federacio. La federacia kongreso 1984 principe okazos en Millau la 19-an kaj 20-an de majo 1984 (ĉar U.F.E. je pentekosto). J Hênin kunordigos.

Fine ni diskutis pri:

- La federacia libroservo. La nova prestiĝa broŝuro je 25,00F estas tro multekosta.
- Vigla interŝanĝo de ideoj inter J. Hênin kaj F. Maurin pri la planata libro pri turismo en nia regiono.
- Ekspozicio per murpaneloj kun trafa argumentado de J. Hênin por venki la psikologiajn barojn de la publiko pri Esperanto.
- Juna irana esperantistino (18 jara),kiu deziras veni en Francion por plibonigi siajn konojn de esperanto kaj de la franca lingvo. Sin turni al J. Hênin.

J. Amouroux.

## VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

### montpellier

*Ĵus realiĝita · "50 Ans... ET PLUS D'ESPERANTO" en la franca, ĉefe por novuloj, kiel instigilo por persisti ; kun kelkaj konsiloj.*
*17 paĝoj el kiuj 4 kun fotoj Formato 29 X 21*
*Havebla kontraŭ 5 poŝtmarkoj.*
*Mendebla ĉe LENTAIGNE, 3, Av. Gaillarde 34000 MONTPELLIER*

*"20 CHRONIQUES" pour RADIO-AGORA (Montpellier)*
*20 paĝoj 29 X 21 . Kontraŭ 5 poŝtmarkoj*
*Se vi mendos la du broŝurojn kostos 9 poŝtmarkojn.*

### nimes

Jen la nova Eeestrarooo de la Nima Rondo!

Honora Prezidantino — Sinjorino VOLPELIERE
8 rue Rouget de Lisle 30000 NIMES.

"§"
***

Prezidanto — Sinjoro CARREY
1777 Chemin du Mas de Roulan. NIMES.
(la dejora tajpisto. Dankon por li! Dankon.)

"§"
***

Moŝta Sekretariino — Amikino SOULIER
213 Av. de Camargue 30230 Caissargues

"§"
***

Perceptema Kasisto — Sinjoro TRIGAN
Li Becarut 48 Galerie R.Wagner NIMES.

"§"
***

Post la infana jaro
Post la virina jaro
Atentu! Jen la RIDA JARO!!!



## bèziers

La jaro 1982-1983 bone disvolviĝis. Okazis kurso,regule,kun 11 gelernantoj mense junaj. La plimulto apartenas al la universitato 3a aĝo kun kiu ekzistas bonaj rilatoj. Do,en oktobro nova kurso estas antaŭvidita. Se eble,ni provos gvidi 2 kursojn: komencantoj kaj progresantoj.

Okaze de la vizito de Sinjoro Todorov,ni havis bonan sukceson: pli ol 50 homoj. En la antaŭaj jaroj,neniam la ĉeestantoj estis tiel multaj. La kaŭzoj?? Verŝajne,la vetero nuba malvarma ne allogis la homojn promeni,kaj plie,striko de T.V. ne allogis la homojn resti hejme!!!

La venontaj monataj kunvenoj okazos la 8an de oktobro, 5an de Novembro, 3an de decembro.

Cu estus eble plani Zamenhofan-tagon kun najbara(j) grupo(j)? Ni esperu!!!

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## alès

Pro la transloĝiĝo de Sinjorino MOUNIER, nia agema kasistino - al kiu ni renovigas niajn bondezirojn pri agrabla restado en NICE - la jarkunveno okazis iom pli frue ol kutime - t.e. la 2an de novembro 1982 en ALES.

Sinjorino SOULIER konsentis roli kiel kasistino,almenaŭ provizore,Sinjoro CORNUT (Ales) restas sekretario kaj mi mem prezidanto

Ek de oktobro 1983 la kotizo valoros por la lernejjaro. Ni fiksis ĝin je 5 frankoj!

Izoluloj bonvolu pagi pere de nia p.ĉ.k. = Féderation départementale du Gard pour l'Espéranto. Montpellier 1857 07 B - kaj aldoni 15 frankojn por abono al Sudfranca Stelo.

# Iom pri Federacio Gard

La "Féderation départementale du Gard pour l'Espéranto" naskiĝis la 15an de decembro 1968!

Gi celas:

- Unuigi la Esp. grupojn kaj la izolitajn esperantistojn de nia departamento.
- Intensigi la kulturan kaj edukan agadon de la lingvo.
- certigi ties pli grandan diskonigon.

Gi ricevas ioman monhelpon de la Generala Konsilio,kio ebligis al ni krei cirkulantan ekspozicion je 50 volumoj,fabrikigi larĝan banderolon,donaci librojn al diversaj publikaj bibliotekoj.

Je diversaj okazoj ni atingis,per leteroj kaj dokumentoj,la politikajn kaj civilajn instancojn pri la avantaĝoj de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Kaj la 10an de aprilo 1974 la Generala Konsilio voĉdonis rezolucion favora al la enkonduko de la lingvo en la ŝtataj lernejoj.

Ni organizis diversajn "tagojn de Esperanto" kun ekspozicioj kaj disdono de flugfolioj. Ekzemlple: Sommières,Bagnols/Cèze,Uzès,la Roque/Cèze,Beaucaire, Villeneuve-les-Avignon.

Bedaurinde de kelkaj jaroj la Federacio ŝajnas iom dormi. Gi bezonos novan sangon. Ni esperas ke eblos trovi en nia anaro junan skipon kapablan pluteni la torĉon.

R.R.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

## Lastmomente

### EKSPOZICIO

Por la dua fojo Esperanta Rondo partoprenis en la "Foire aux Expositions", la 19an kaj 20an de novembro.

Belaspektis nia stando aranĝita de Sinjorino SOULIER. Sur la muro okulfrapantaj afiŝoj kaj prezento de libroj. Sur la tablo gazetoj,revuoj,turismaj prospectoj,libretoj je la dispono de la publiko por foliumiado kaj propagandiloj.

Eĉ nur preterpasantoj ne povis ne rimarki ĝin. Kelkaj vizitantoj tamen haltis,ŝajnis interesiĝi je la internacia lingvo, ties eblecoj kaj utileco,kaj petis de ni informojn.

==========================================================================================

De la 11an de oktobro S-ano BORQUE gvidas elementan kurson de Esperanto ĉe la kultura Centro de Grazailles.

Okaze de la unua datreveno de la aperturo de tiu Centro, la 22an de oktobro,la Esperanta fako prezentos ekspozicion pri Esperanto.

## carcassonne




## NI FUNEBRAS

En NIMES,la 19an de Aprilo 1983 mortis 74 jara nia samideano

GILBERT PUECHAGUT.

Ni memoras pri korpe kaj mense vigla kunulo. Jam longe,pro malsano,li ne plu vizitis niajn kunvenojn.



Kruela bato trafis la Nimesan samideanaron.

Apenaŭ kelkajn tagojn post la forpaso de nia amiko PUECHAGUT, venis al ni la malĝoja informo pri la morto de Hubert JANNEZ, Prezidanto de la Nimesa Kulturcentro.


Ni ja sciis ke pro iskiatiko oni devis enhospitaligi lin en Montpeliero. Bedaŭrinde baldaŭ aperis komplikaĵoj kiuj venkis la vivofortojn de nia amiko.

El Korsika deveno,kvankam li naskiĝis en la metropolo kie li studis,li eniris en la porinstruista seminario en Besançon. La tiama rektoro de la akademio estis Sinjoro Pariselle,fervora adepto de Esperanto. Li certe ludis gravan rolon en la decido de JANNEZ lerni la internacian lingvon.

Nimano de tridekoj da jaroj,li aktivis en la vivo de la loka grupo kies Prezidanto li fariĝis post la freŝdataj malaperoj de Sinjoro Volpeliere kaj Doktoro Salan. Per Esperanto li ofte vojaĝis eksterlanden kaj sin preparis viziti Hungaran samideanon kiam li malsaniĝis.

Ni certigas liajn gefilojn kaj familianojn pri nia simpatio kaj kore ilin kondolencas.

R.R.




NOS HOMMAGES

à Monsieur Hubert JANNEZ
Palmes Académiques
décédé le 8 mai 1983


Selon ses voeux son corps a été incinéré le mercredi 11 mai à 9h30,à Montpellier au complexe Funéraire de Grammont.

Messieurs Roberto Frus,François Roignant,amis de toujours,mais aussi ses nombreux amis s'associent à nous pour ce dernier Hommage. A notre grand ami le "Prof",qui alliait classe,humour,savoir et sa générosité pour l'Espéranto. Les générations futures feront de cette langue le symbole de l'avenir de Paix .

---

NI GEMU,GEMU,GEMU, SED ESPERU!!!

## NE FORGESU




1984
Datoj kaj ciferoj

Jen kelkaj memorindaj datoj:

- 14-an kaj 15-an de januaro,triagrada esperanta kurso en Parizo (traduk-ekzercoj preparotaj antaŭe)
- De la 1-a ĝis la 7-a de aprilo en Baugé (Grésillon): internacia renkonto de infanoj.
- De la 28-a de aprilo ĝis la I-a de majo: Lingvo-staĝo en Valras (pluraj niveloj)
- Sabaton la 19-an kaj dimanĉon la 20-an de majo: federacia kongreso en Millau. (memoru: majo en mijo/mijo en majo!)
- de la 9-a ĝis la 11-a de junio (pentekoste): Nacia kongreso en Bourges. (rekta fervoja linio de Béziers)
- Julio kaj aŭgusto: multaj eblecoj,kiujn ni detale priskribos en la venonta numero...
- De la 9-a ĝis la I6-a de septembro,la nun kutima semajno de Sète. Ankaŭ aŭtuna federacia kunsido.

Tarifoj de Grésillon:
taga prezo (tranoktado kaj tri manĝoj) pli ol-7tagoj
- en unupersona ĉambro: 110F.
- en ĉambro por familio(ĝis 5 pers.) 93F.
- en komuna ĉambro: 82F.
- tendumantoj: 76F.

## PAGOTAĴOJ

Aliĝoj: morala aliĝo utilas,eĉ se ĝi ne sufiĉas!

| | | |
|---|---|---|
| UFE..... | - simpla membro (kun E° actualités) | 60F. |
| | - aktiva membro (kun " kaj Franca Esperantisto) | 155F. |
| | - " " ( por paro ) | 230F. |
| UEA..... | - Membro MJ (kun jarlibro) | 76F. |
| | - Membro MA (jarlibro kaj "Esperanto") | 190F. |
| JEFO.... | - ĝis 26 jaraj...Simpla membro (kun "koncize") | 60F. |
| | - por pli aĝaj...Patrona membro (kun "koncize") | 60F. |
| | - Aktiva membro (koncize kaj F. Esp.) | 140F. |
| | | aŭ 155F. |
| TEJO.... | - Membro TJK (jarlibro + "kontakto") | 76F. |
| | 6 Membro MAK (id. + "Esperanto") | 190F. |

Se tio tedas vin... ALIGU al MI... (La bezonanta tajpisto!)

Perkoresponda kurso de UFE : 250F. (2=350F./3=360F.) intensiva kurso: 190F.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

RIDETU RIDU RIDEGU

KONATAJ ABONTARIFOJ

Heroldo: 80F. Monato: I40F. El Popola Cinio: 1j=40F. 2j=68F. 3j=96F.

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

RESPONDECULOJ

Reciproka informado: ĉu vi resendis - la informilon pri E. kursoj en lernejoj al E. Ludwig???
- la enketon de UFE pri loka agado en 83 kaj planoj por 84 al UFE "kaj" federaciestro?

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

NOVAJOJ

Vidkasedo : infanrenkonto 82 en Grésillon kaj intervjuo de T. Tyblewski en Rennes. Tute en Esperanto (luprezo = 20F.+ resendkostoj)

Lumbildoj: serio por ekspozicio pri Esperanto = 35F.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

PUB GRATUITE!

Un nouveau périodique d'information,plus spécialement destiné aux profs de langues,a été lancé en Juin. Les langues principales sont actuellement le Français,l'Anglais,le Néerlandais et l'Allemand,mais le rédacteur est disposé à ouvrir ses colonnes aux autres langues (Espagnol,Italien...)

Le numéro d'octobre comprendra un article sur l'Espéranto et un cours pourra être présenté à partir de décembre.


Références: Carrefour de langues.
145 Grand-Route.
1428 Lillois-Witterzée.

Tel: 02/ 384.86.16.

Fascicule: "Up to date teacher".

Rédacteur: Patrick Wauquier.

Abonnement: 200FB. au compte 799-530 2990-12.
envoyer également une fiche mentionnant nom,adresse, éventuellement école et langues parlées.




???

Pri tiu artikolo nur respondecas tiu kiu ĝin sendis. La tajpisto lavas siajn manojn kaj
mi purigu la tajpilon.mi purigu la tajpilon.mi purigu la tajpilon.mi purigu la

££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££

NI RADE RIDU DIRIS NERUDA

# KRUCVORTOJ

R. RAYNAUD (1983)

|  | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 |  |  |  |  |  |  |  |  |  |  |  |  |
| 2 |  |  |  |  |  |  |  | ■ |  |  |  |  |
| 3 |  |  |  |  |  | ■ |  |  |  | ■ |  |  |
| 4 |  |  |  | ■ | ■ |  |  |  |  |  |  |  |
| 5 |  |  |  |  |  |  | ■ |  |  |  |  | ■ |
| 6 |  |  |  |  |  |  |  | ■ |  |  |  |  |
| 7 |  |  |  | ■ |  |  |  |  |  |  | ■ |  |
| 8 |  |  | ■ |  |  |  |  |  |  |  |  |  |
| 9 |  | ■ |  |  |  |  |  | ■ |  |  |  |  |
| 10 |  |  |  |  | ■ |  |  |  | ■ |  |  |  |
| 11 |  |  |  |  |  | ■ |  | ■ |  |  |  |  |
| 12 |  |  |  | ■ |  |  |  |  |  | ■ |  |  |

## Horizontale *

1 – Li semas kaj semas konstante (R)
2 – Ruĝa tubera radiko (R) Dekpieda krustulo (R)
3 – Ŝekspira dramo – Kurienkontraŭa direkto (R)
Pronomo
4 – Ensuĉi (R) Unu ne alportas printempon
5 – Ŝainigi – Inverse: murrompilo
6 – Li praktikas korpekzersado (R) Sensalaka fiŝo (R)
7 – Vicmontra numeralo – Kuŝigi
8 – Pronomo – Poemo ... iom speciala
9 – Kapabla sperti doloron kun serana sintegeco (R)
Rilata al norvega urbo
10 – Tia stomako ne lernas volonte – Fonetike petalaro
Pli malpli viskeca substanco (R)
11 – Spirtubo (R) – Vesto sen maniko
12 – Fonetike: antiva greka monero
Havigi al iu vivrimedojn –
Interjekcio esprimanta bedaŭron –

## Vertikale *

1 – Ĉefrolulu en filmo, dramo, romano
2 – Konfirmi traktaton – Pomujo aŭ platano (R)
3 – Volonte fordonas sian tempon aŭ monon pro la servo de iu aŭ io – Loĝejo por bruto (R)
4 – Blanketa (R) En la centro de akno – komenci batalon (R)
5 – Membro – Laboro – Prepozicio
6 – Prefikso – Rongulo ne danĝera tamen ne karesu ĝin (R)
7 – Interna korto ĉe la Romaj domoj (R) – Adepto de politika reĝimo en kiu la regpovo (R)
8 – En la fino de aventuro – En konkurso [apartenas al la pastra klaso
9 – Ĝi servas kiel pruvo kaj atesto – Komencas rikani
10 – Inversita pronomo – Hitlerismo
11 – Fiŝo el familio de perkedoj – Societo
12 – Nombro aŭ cifero – Subteraj kanaloj

* – (R) nur radiko
* – Solvo de la antaŭa problemo

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| F | R | A | N | K | O | L | I | ■ | O | ■ | I |
| O | I | S | O | ■ | M | A | R | A | T | O | N |
| K | L | O | R | ■ | B | R | O | K | A | N | T |
| S | A | I | M | I | R | I | ■ | S | ■ | I | E |
| T | T | ■ | A | L | E | K | S | A | N | D | R |
| R | I | G | L | I | L | O | ■ | N | E | I | ■ |
| O | V | ■ | A | R | O | ■ | K | O | K | R | I |
| T | O | L | ■ | I | ■ | N | E | ■ | T | O | P |
| O | ■ | A | B | O | C | O | ■ | G | A | J | E |
| ■ | O | K | A | ■ | I | R | ■ | A | R | ■ | R |
| O | K | U | P | I | ■ | E | K | Z | I | L | I |
| L | A | N | T | E | R | N | O | ■ | N | E | T |

V

Solvo
de la krucvortoi
aperinta sur la N·85

# 5 minutoj de paùzo





*Kredu min Bruno nuntempe nia sezonlaboro estas finita.*




*Aùskultu min bone Karlo, ĉesu iri al pacmanifestacioj.*




*Ĉu vi perdis okulvitrojn sinjoro ?*



*Tamen ofte vi asertis ke la infano povas sola trankvile trinki akvoglason !*



*Ne plu rakontu min ke la ruĝfiŝo disŝiras Kurtenojn.*





*SEN VORTOJ*

R. Vms

1983

Sian 75-jaran jubileon festis la NOrdfranca Esperanto Federacio de Valenciennes,ĉe la urbodomo,en salono Chatham,flanke de strato "Nouvelle Hollande",dimanĉe, la 9an de oktobro 1983. TESTA (Teatro Esperanta Pariza) animis per skeĉoj la posttagmezan distran programon.............................................



# Gaja manifestacio !

Kun feliĉo la Nima Grupo anoncas al vi la baldaŭan geedziĝon de nia ĉarma amikino

MIREILLE VERNET

kun


ERIC FONTENAY

kiun ni esperas baldaŭ enkalkuli en nia grupo.

Al la juna paro ni deziras feliĉon kaj prosperon

Kiel Prezidanto de la forta Nima Grupo, la fortanima tajpisto(!!!) sendas al ŝi... dikan "smaĉon"





Okaze de Kristnasko kaj Jarŝanĝo
ni esprimas niajn sincerajn Bondezirojn
al ĉiuj niaj Legantoj kaj Simpatiantoj.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES
Dépot Légal : 3ème Trimestre 1983
Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes